

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## TIEL OKAZIS

### Ekspozicio de fotoj

sept. 5 kaj 6, en la ekspozicia halo de Kanagaŭa-Kenmin Sentaa

Ni ekspoziciis jene: (1) rilato de Esperanto kaj UNESKO, (2) libroj de Serio Oriento-Okcidento, (3) fotoj pri la scenoj, en kiuj ni interamikiĝas monde per Esperanto, (4) historio de Esperanto en Jokohamo, Japanio kaj la mondo, (5) videoj

### Pri miaj someraj spertoj

sept. 5, 14h15-16h30, ĉambro 102

2 personoj rakontis pri temo alia ol Esperanto, kaj 7 personoj pri la ĉi-jara 100-a Universala Kongreso en Lillo aŭ vojaĝo aliloke dum kaj post la UK.

### La 100-a legokunsido

sept. 12, 13h00-15h00, ĉambro 707

Kunvenis 8. Lego-impresoj aperas en tiu ĉi n-ro.

### Aŭtuna rudimenta kurso

de sept. 26 ĝis dec. 12, 15h00-17h00, en iu ĉambro de Kanagaŭa-Kenmin Sentaa

Estas 2 kursanoj.

## NIAJ PLANOJ

### La 45-a Zamenhof-Festo de Kanagaŭa

Dec. 6, 13h00-16h30, en la Provluda Ĉambro de la Civitana Teatro, ĉe la Kultur-Centro Ŝoonandai, en urbo Fuĵisaŭa (Huzisawa).

De 13h00 por 90 minutoj, estos prelego malfermita al la publiko (sen kotizo) de nia esperantista bardo Hori Jasuo, kiu parolos pri sia sperto rakontadi pri la Katastrofo en marto 2011 pro tertremo kaj nuklecentrala akcidento, esperantlingve al la mondo.

De 15h30 estos horo dediĉita al esperantistoj, kun kotizo je 800 enoj.

### La jarfina festivalo de nia rondo

Dec. 19, post la kutima lernokunsido.

Loko: Fukuyoken en la ĉina kvartalo

### Voĉlegita en retradio

Lastatempe, artikoloj el "Novaĵoj Tamtamas" estas foje voĉlege prezentitaj en 3ZZZ, radioelsendo el Melburno, Aŭstralio: <http://melburno.org.au/3ZZZradio/>.

\* En la 10a de aŭgusto, "Ĉiuj rajtas vivi" de Doi Ĉieko.

\* En la 28a de septembro, "Handikapito je okuloj" de Murata Kazuyo en la n-ro 305 de "Novaĵoj Tamtamas", legata en 5 minutoj.



ekspozicio de fotoj kaj libroj

---

---

## 100a Legokunsido

---

---

En la 12a de septembro, ni havis la 100an Legokunsidon por "Padma, la eta dancistino" de Tibor Sekelj, kaj ok personoj partoprenis.

### Padma, la eta dancistino

Mizro Iwaya

Tiu ĉi libro estis eldonita en la lasta jaro post la morto de la aŭtoro Tibor Sekelj. Ĝi estas ĉarma rakonto pri hinda knabino nomata Padma. Ŝi loĝas en Kondapur, vilaĝo en norda Barato, kun sia familio. Aperas diversaj epizodoj rilate al la vilaĝa vivo: serpenta dresisto, festo, dancistino, saĝulo saduo ktp. La zenito de la historio estas malkovro de antikvaj skulptaĵoj en kaŝita kaverno. Ĝi kaŭzas grandan sensacion kaj ŝanĝas la vivon de la vilaĝo.

La aŭtoro eldonis similan infanlibron antaŭ dekoj da jaroj titolitan "Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo". Ĝi estis pri la knabo kiu savis ŝippereantajn pasaĝerojn per sia talenta ĉasarto. Li montris mirindan scion kaj teknikon en la sovaĝa ĝangalo. Dume en tiu ĉi libro la vojaĝanto-parolanto estas simpla eŭropano kaj la loĝantoj en la vilaĝo estas primitivaj lokaj personoj. Nenio eksterordinara laŭ la vidpunkto de "progresintaj eŭropanoj". Li emas pli instrui ol esti instruata. Okazis diversaj spektakloj sed ili ne estas vivfatalaj fenomenoj.

La aŭtoro eldonis pli ol dekon da verkoj dum sia vivo. Lia unua libro estis tute sukcesa "Uragano super Akonkagvo". Ĝi estis senfikkia raporto pri pereinta ekspedicio sur la monto Akonkagvo, Argentino. Tiu akcidento mem estis granda skandalo en la lando. Li skribis ĉion ĝuste laŭ sia mema sperto. Eble due sukcesa estis "Kumeŭaŭa", kiu estis fikcio bazita sur la faktoj. Tie duon-pereanta ŝipo, vere vivfatala akcidento, estis savita, kaj la parolanto estis "mi". Nun la nova libro "Padma" estas simple fikcia kaj la parolanto estas "onklo Bend", tria personeco. Do la tuta strukturo estas fikcio. La aŭtoro spertis loĝi en Barato dum kelkaj monatoj kaj certe havis multe da renkontiĝoj tie. Tio fruktiĝis en tiu verko. La okazaĵoj ne estis vivfatalaj kvankam ili estas interesaj. Do mi povas konkludi: se la okazaĵo estas vivfatala, li verkas senfikkie, se ne, fikcie.

Laste mi ripetas ke tiu ĉi libro estas ĉarma rakonto. Ĉiu povas legi ĝin sen nervostreĉo.

### Padma kaj Kumeŭaŭa

Sibayama Noriko

"Padma, la eta dancistino" estas bele bindita infanlibro. Mi komparu la libron kun "Kumeŭaŭa" kiun verkis la sama aŭtoro. Ĉefrolulo estas knabino en "Padma" kaj knabo en "Kumeŭaŭa". Kumeŭaŭa sola helpas eĉ plenkreskulojn montrante abundan saĝon, dume Padma ricevas helpon de saĝa plenkreskulo. Kumeŭaŭa estas kuraĝa kaj nenion timas, dume Padma timas eĉ reflekon de spegulo. Ĉiam Kumeŭaŭa estas aktiva kaj Padma estas pasiva. Kumeŭaŭa kaj Bend ludas saman rolon nome preskaŭ ĉiopovan helpanton.

Al mi ne plaĉas stereotipa rolo de knabo kuraĝa, saĝa kaj knabino timema, malforta. (En la 2a ĉapitro, estis ankaŭ knabo, kiu malkovris kaj sciigis al Padma, ke la serpento ne havas venenajn dentojn.) Sed antaŭ 30 jaroj kiam la rakonto estis verkita, ĉu postuli de la aŭtoro inverson pri la rolo estas neeble?

Fine vilaĝanoj ĝojas, ke post nelonge la vilaĝo civiliziziĝos pro la trovitaj figuroj en la kaverno. Tamen ĉu civiliziziĝo estas tiel ĝojinda afero? Iom post iom malaperos tradiciaj moroj. Ĉu tiel nomataj civilizitaj homoj ne faros malbonon por gajni monon?

Ŝajnas al mi "Kumeŭaŭa" estas komplete fantaziaĵo, sed "Padma" estas reale okazebla rakonto.

Interalie, mi deziras iom pli ĉarmajn geknabojn en la desegnaĵo de paĝo 50.


### Bend, la ĉioscianto

--- impresado de "Padma" ---

Sibayama Zyun'iti

En hindan vilaĝon ekloĝis eŭropano Bend, poste li instigas vilaĝanan knabinon Padma esti dancistino, kaj forirante de la vilaĝo, li petas ĉefurbajn homojn, ke ili akceptigu ŝin en ĉefurba (t.e. novelhia) lernejo por arta dancado. Ho, feliĉe, feliĉe ... Jen la skeleto de la rakonto. Sed male al la rakonto "Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo" de la sama aŭtoro Tibor

Sekelj, ĉi-rakonte la ĉefrolulo Padma ne estas supere kapabla. Nu, tio mem estas ne malbona, kaj intimigas ŝin al legantoj samaĝaj al ŝi. Certe ŝi estis kuraĝega, kiam ŝi falis en kavon kaj eskapis el ĝi, sed en aliaj rakontfadenoj ne estas tiel. Ekzemple, la sekreto ke la serpentoj de la serpentistoj ne estas vere venene danĝeraj, malkovris ne ŝi, sed knabo apud ŝi. La misteron de fantomoj scienciste malkovras Bend sen ajna hezito, kvazaŭ en detektiva rakonto. Bend povu malkovri, sed por interesi leganton, li post provado kaj erarado malkovru! En kavo Padma trovis diecajn figurojn kiel Viŝnuon kaj Ŝivaon, sed pri tio komplete komentarias Bend, kvankam la rakonto pri la dioj estas la hinda afero mem. Tiel, la scipleneco de Bend estas troa, mi sentis.



Alia afero, kiun ne konscius supozataj legantoj geknabaj, sed sagaca plenkreskulo, estas jena: Padma lernas dancarton de migranta dancotrupo, sed ĉu tiu danco estas la sama al la danco lernebla en ĉefurba danc-akademio?

## Leginte “Padma, la eta dancistino” de Tibor Sekelj

Tanigawa Hiroshi

Malgranda vilaĝo Kondapur estis la scenejo de ĉi tiu noveleto. Ĝian realan lokon mi ne povis certigi sur la nuna hinda mapo. Ĉu, do, la epizodoj rakontitaj en ĝi estas tutfikciaj entute?

Unu vojaĝanto nomata Onklo Bend, erudiciulo simpatia al hindaj vilaĝanoj gastigis ĉe la familio de Kumar. Knabino Padma, la heroino de ĉi tiu noveleto, estas filino de Kumar. Ŝi estas 10-jara, tre naiva sed ege scivolema kaj kuraĝa.

Iun tagon unu danco-muzika trupeto venis en la vilaĝon. Spektinte kaj rave kortuŝite de la dancoprezentado de la trupeto, Padma petis de la dancistino instruon de la danco.

Nur per kelkhora leciono Padma gajnis danckapablon je miriga nivelo. Kaj okaze de la antaŭvespero de fama Festivalo de la vilaĝo, Padma surprize mirigis la kolektiĝintajn vilaĝanojn per sia fascinega danco.

Iun tagon Padma kaŝludis kun geamikoj, kaj portempe perdiĝis. Kiam ŝi reaperis, ŝi tremegis

pro teruro kaj diris: Mi vidis fantomon! Vere fantomojn en la kaverno!

Onklo Bend petis Padman konduki al la loko kie ŝi vidis “la fantomon”.

Ŝi gvidis lin en la kavernon, kies ekziston neniu sciis ĝis tiam. En la kaverno ili vidis realajn figurojn de la “fantomoj”, kiuj tiom terurigis Padman. Staris diversaj pompaj skulptaĵoj de la hinduaj Dioj.

La postan tagon Bend kaj Padma denove eniris en la kavernon. Bend pli detale esploris kaj diris al Padma:

Jen, Statuo de Dio Ŝivao! Kaj de Viŝnuo kaj Bramo...! Vi ja malkovris mirindan subteran templon!

10 tagojn poste venis al la vilaĝo sciencistoj nome de la Instituto pri Historiaj Monumentoj en Novdelhio. La ĉefo nomiĝis Kusum Gupta.

Gvidate de Bend kaj Padma, la sciencistoj fervore kaj precize esploris la kavernajn templojn, kaj konkludis, ke ĉi tiu subtera templo estis, antaŭ pli ol mil jaroj, grava kulturcentro de la tuta regiono.

La ĉefo de la esplorsciencistoj proponis al Padma kaj Bend rekompencan pro la kulture valorega malkovro de la kavernaj temploj.

Fine estis decidite ke, Padma povu studi en lernejo en Novdelhio por arta danco.

Leginte la epizodon de la tute hazarda malkovro de mirinda subtera templo, mi pripensis pri ĝia ia simileco kun la malkovro de la monde famaj “la Murbildoj en la Kavoj de Altamira” en norda Hispanio kaj “La Murbildoj en la Groto de Lascaux” en okcidentsuda Francio. Rilate la realajn kavernajn templojn en antikva Hindio, estas “La Kavoj de Aĵanta” kaj “La kavoj de Ellora”

La rakonto en ĉi tiu noveleto rememorigis min al unu rakonteto verkita de Eroŝenko; “Malvasta Kaĝo”. La scenejo de la verketo estas Hindio. Unu tigro agonianta en arbaro enfermite en malvasta kaĝo aspiregas al libero. Ĝi domaĝegas la malfeliĉon ankaŭ de la homoj pro ilia enfermiteco.

Prezentiĝas en la rakonteto ankaŭ unu hinda virino viktimita pro la tragedia hindia moro. Kiam edzo mortis, lia edzino devas morti.

La noveleto “Padma, la eta dancistino” ekscitis min al Hindio antikva.

## VASILIJ EROŜENKO – JAPANA POETO (9/ fino)

Tatyana Auderskaya (Ukrainio), verkita en 2012

Nature, Eroŝenko ne longe restis en Moskvo. Ekde 1949 li eklaboris kiel instruisto de fremdaj lingvoj en lernejo por plenkreskaj blinduloj en Taŝkento. En 1951 li faris sian lastan grandan vojaĝon – al Jakutio. Kiel ĉiam, li volis fondi ie en siberia malproksimo lernejon por blinduloj... Sed la sano jam feblis: li maldikiĝis, komencis rapide laciĝi. Krom tio, li suferis pro malaro, akirita en juneco dum siaj vojaĝoj en ĝangaloj. Do, li ne restis en Jakutio, sed en 1951 forveturis ankaŭ el Taŝkento hejmen al Obuĥovka: ripozi, kuraci sin, okupiĝi pri literatura laboro...

Kuracistoj verdiktis teruran diagnozon: kancero. Sed Eroŝenko neniam timis morton. Lin interesis nur, kiom da tempo restis al li vivi, kaj kion li sukcesos fari dum tiu tempo. En majo 1952 li vizitis siajn fratinojn en Donbass, Harkovo kaj Karelio. Tio estis lia lasta vojaĝo.

Li mortadis same modeste, kiel li vivis: laborante tage kaj nokte, penante malplej zorgigi la ĉirkaŭantojn.

La plej malbona afero estas, ke ĉio, kion li verkis en nia lando, malaperis pere. Estis forbruligitaj du libroŝrankoj da liaj manuskriptoj kaj libroj en Kuŝka. Senspurre perdiĝis la libro, pri kies manuskripto li laboris ĝis la morto, kaj pri kiu li diris: “Jen la libro – rezulto de miaj meditoj, resumo de mia vivo. Nun, kiam ĝi pretas, mi povas morti trankvile”. La tutan sian arkivon kaj bibliotekon, kolektitajn dum la lastaj jaroj de la vivo, Vasilij Eroŝenko testamentis al Tutrusia Blindula Societo; sed ĉio estis neniigita en Obuĥovka.

Li tute ne estis bezonata al sia patrujo.

Lia koro restis en Japanio.

En la japana lingvo oni eldonis kelkajn liajn verkarojn, inkluzive la plenan verkaron en 3 volumoj. La lasta eldono de liaj verkoj okazis en Japanio en 1996. En la rusa lingvo estis eldonita lia rakontaro “La koro de aglo” en 1962 kaj “Elektitaj verkoj” en 1987; en la ukraina – rakontaro “La floro de justeco” en 1969 kaj “Fabeloj kaj legendoj” en 2004. La sesvoluma eldono de liaj verkoj en Esperanto aperis en Japanio sub redaktado de Miyamoto Masao.

Aperas la demando: ĉu Vasilij Eroŝenko estas rusa verkisto? Takasugi Itiroo skribis, ke

“Eroŝenko estis konsiderata japana verkisto”. Li ricevis agnoskon kiel poeto kaj estis aprezata en japana literatura mondo. Por li estis destinita loko en “Enciklopedio de nuntempa japana literaturo” de eldonejo Sindajŝja. Fabeloj de Vasilij Eroŝenko eniris en la multvolumaron “Biblioteko de japana literaturo por infanoj”, eldonita de Kawade Syobo en 1953.

Li eldonadis siajn verkojn ne nur en la japana, sed ankaŭ en la ĉina lingvo, en Esperanto kaj en la rusa. Lia sorto estas vere paradoksa: li verkis en fremdaj lingvoj, kiuj fariĝis por li kvazaŭ propraj. Akademiano N. I. Konrad, elstara fakulo pri orientaj literaturoj, rimarkis, ke ĉio, kion verkis Vasilij Eroŝenko ruslingve, ŝajnas esti tradukita de iu el orientaj lingvoj.

Li estis mirinde dotita persono: kantis, gitarludis, konis dekojn da lingvoj, verkis poemojn, fabelojn, legendojn en la rusa, japana, Esperanto. Josiko Juasa (湯浅芳子), literaturologo, tradukisto de verkoj de Dostojevskij, Ĉeĥov, Gorkij al la japana lingvo, tiel rememoris pri Vasilij Eroŝenko: “Ĉiuj, kiuj renkontiĝis kun Ero-sjan (tiel oni nomis lin en Japanio), konservis la plej bonan impreson pri li. Li lasis post si memorindan spuron sur la tero. Pura kaj klara animo... Blindulo, li vere estis kondukisto por multaj vidantoj”.

Kiel ĉiu vere granda homo, li estis tre bonkora kaj puranima. Tio videblas en liaj literaturaj verkoj; tion atestis ankaŭ rememoroj de liaj samtempuloj. Tiu homo laboris por homoj; per sia vivo kaj agado li unuigis la homaron. Kaj en la komuna kulturo de la homaro restos ĝiaj kunigantoj kaj konstruantoj, kaj inter ili - Vasilij Eroŝenko, blinda poeto, klasikulo de japana literaturo, naskita en Kurska gubernio.

Jes, li povis diri pri si mem:  
Ekbruligis mi fajron en kor’,  
Ĝin estingos nenia perfort’;  
Ekflamigis mi flamon en brust’,  
Ĝin ne povas estingi eĉ mort’.

Brulos fajr’, ĝis mi vivos en mond’,  
Flamos flam’ ĝis ekzistas la ter’.  
Nom’ de l’ fajr’ estas am’ al homar’  
Nom’ de l’ flam estas am’ al liber’.

(fino)